

Statuto de INA (Internacia Naturkuraca Asocio)



1. Tiu ĉi statuto aludas al unuiĝo kun la titolo "Internacia Naturkuraca Asocio", por kiu taŭga mallongigo estas INA, aŭ en la nuna teksto: la asocio.

2. La asocio konsistas el organizaĵoj kaj individuaj personoj, la sidejo estas en Seulo, Korea Respubliko, sed translokiĝo de la sidejo eblas, se necesa pro ŝanĝo en la cirkonstancoj de la asocio.

3. La asocio havas la ĝeneralan celon pli faciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj en la kampoj de la naturkuracado, indifere de la nacieco, ŝtataneco, raso, religio, politika sinteno kaj gepatra lingvo de la individuaj homoj, kaj kontribui al la diskonigo de naturkuracaj metodoj kaj terapioj tutmonde.

4.1 La asocio povas atingi sian celon per jenaj agadoj:

4.1.1 Apogado ĝenerale al ekzistantaj Esperantistaj organizaĵoj, kun aparta favora apogado al tiuj organizaĵoj kiuj aŭ instruas la lingvon aŭ povas ebligi pli alt

nivelan konon de la lingvo per fakaj vortaroj kaj studlibroj .

4.1.2. Agadoj por ebligi la eldonadon de fakaj terminaroj kaj faklibroj por la kampoj de naturkuracado, kaj la daŭran laboron ĝisdatigi tiajn verkojn.

4.1.3. Agadoj por ebligi renkontiĝojn de membroj de la asocio, kaj por starigi studseminariojn je kiuj estu prezentataj referaĵoj pri esploroj faritaj en la apartaj kampoj de la naturkuracado kaj sanaj vivstiloj;

4.1.4. Subtenado de membroj agantaj por aranĝi kontaktojn inter si aŭ inter samspecaj organizaĵoj, uzante la internacian lingvon Esperanto, kun la celo interŝanĝi scion kaj sperton pri la diversaj disciplinoj kaj aspektoj en la naturkuracado.

4.1.5. Eldonado de faka bulteno aŭ de alia formo de revuo, kaj/aŭ subtenado de aliaj revuoj, precipe per varbado de reklamancoj (ekzemple de entreprenoj),

Statuto de INA (Internacia Naturkuraca Asocio)

en la Internacia lingvo Esperanto, kaj verkado de fakaj artikoloj.

4.1.6. Laŭebla subtenado de ĉiuj agadoj de esperantistoj pliakrigi konscion de la valoro de Esperanto en la apartaj kampoj de intereso, kaj aparte por plibonigado de naturkuracaj rilatoj tutmonde.

4.7. Aplikado de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj alproksimigas la celon de la asocio.

4.2. Por la plenumo de sia celo, la asocio rajtas akcepti aŭ akiri proprajn, akumuli kapitalon, fari investojn, ricevi rentojn kaj dividendojn el investoj faritaj kaj dungi oficistojn.

5. La oficiala lingvo de la asocio estas principe Esperanto kaj laŭ la neceso oni kune uzas la aliajn lingvojn sed ĉiam kune kun Esperanto-traduko.

6.1.1. Ordinara membro de la asocio estas ĉiu individua persono, kiu subtenas la celon kaj pretas akcepti ĉiujn devojn preskribitajn en tiu ĉi statuto.

6.1.2. Profesiaj membroj de la asocio estas ĉiu ordinara membro, kiu profesie okupas sin pri naturkuracado.

6.1.3. Organizaj membroj de la asocio estas iu naturkuracista asocio, kiu uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon Esperanto por naturkuracaj rilatoj aŭ interŝanĝoj, aŭ pretas apogi tian uzadon.

6.1.4. Honoraj membroj de la asocio povas esti tiuj individuaj personoj, kiuj pro

rekonataj meritoj por la asocio estas invitataj akcepti honoran membrecon sekve de unuanima decido de la ceteraj membroj dum ĝenerala kunveno aŭ per skriba voĉdonado. Honora membreco ne implikas la devon fari regulajn kontribuojn al la kaso de la asocio.

6.2. Principe ĉiu membro havas la rajton je unu voĉo en iu voĉdonado, ĉu pri ŝanĝo en tiu ĉi statuto, ĉu pri iu alia decido, kiu leviĝas el aplikado de tiu ĉi statuto. Membreco aŭtomate implikas la devon finance kontribui al la mastrumado de la asocio.

Organizaĵo-membro anoncas al la ĝenerala sekretario la nomon de la individua persono, ne necese ordinara membro de la asocio, kiu ĝuas la fidon de tiu organizaĵo kaj rajtas reprezenti ĝin al la asocio.

7.1. La gvidado de la Asocio estas konfidata al estraro, elektita de la ordinara kaj honoraj membroj de la asocio el inter la individuaj ordinara membroj. Estrarano tenas sian oficon por du jaroj ekde elekto, sed rajtas prezentiĝi por reelekto .

7.2. La estraro konsistas minimume el prezidanto, ĝenerala sekretario kaj kasiisto, kvankam la lastaj du funkcioj povas esti plenumitaj de unu persono.

7.2.1. La prezidanto reprezentas la asocion kaj subskribas kun la ĝenerala sekretario la ĉefajn dokumentojn. La prezidanto prezidas en la estraro kaj en ĝeneralaj kunvenoj, sed rajtas portempe transdoni tiun prezidan rolon al la vicpre-

Statuto de INA (Internacia Naturkuraca Asocio)

zidanto aŭ al portempa prezidanto, se necese.

7.2.2. La ĝenerala sekretario:

- a) zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la estraro,
- b) proponas al la estraro iniciatojn por decido, kaj
- c) ĝenerale prizorgas la eksterajn rilatojn de la asocio.

7.3. La kason de la asocio prizorgas la kasisto (aŭ la ĝenerala sekretario en anstataŭao)), kiu krome regule raportas al la estraro pri la evoluo de la asociaj financoj.

7.4. La estraro kunmetas ĉiujare raporton pri la agado de la asocio, inkluzive de raporto de revizoroj aprobante la kontotenadon, kaj tiun kombinitan raporton publikigas en la daŭro de maksimume kvar monatoj post la fino de la kalendara jaro al kiu ĝi rilatas.

Principe, plena okazo por diskuto estu donata dum ĝenerala kunveno de la membraro, cele al aprobo de la raporto, sed en la jaro dum kiu ĝenerala kunveno ne okazas, aprobo de la raporto sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo krom se pli ol duono de la membroj skribe al la ĝenerala sekretario indikas malaprobon. Alikaze, anonco de ĝenerala kunveno okazas samtempe kun publikigo de la raporto, kun minimuma averto de du monatoj.

8. La ĝeneralaj kunvenoj de la membroj regule okazas, kaj estas okazoj ne nur

por doni aprobon al la jarraporto kaj elekti la estraron, sed ankaŭ por informi pri la celo kaj aktivaĵoj de la asocio kaj por aŭdigi kaj diskutigi referaĵojn pri fakaj esploroj faritaj de membroj.

Estraranoj estas elektataj laŭ la subteno de pli multo da estraranoj kaj honora membreco estata nomumata laŭ la plimulto de la voĉoj de membroj. La elekto okazas per skriba voĉdonado se ne eblas en la koncerna jaro okazigi ĝeneralan kunvenon.

9. En la okazo de neceso disvolvi la asocion, la estraro por simpla plimulto da voĉoj, aŭ la laste restante funkcianta estrarano, nomas komisionon kiu likvidas la kurantajn aferojn kaj transdonas iujn restantajn havaĵojn al Universala Esperanto-Asocio, kun la celo utiligi tiujn havaĵojn por similaj celoj.

10. Al tiu ĉi statuto povas esti aldonata interna regularo kiu estu proponita de la estraro kaj aprobita de la membraro laŭstatute.

Regularo por la perantoj

1. Kondiĉoj: Kandidat-peranto estu membro kiu regule pagas sian kotizon.

2. Nomumo: La prezidanto proponas nomumon de nova peranto al la membroj per cirkulero aŭ per anonco en la bulteno/revuo de la asocio. La nomumo iĝas definitiva se neniu malaprobas ĝin ene

Statuto de INA (Internacia Naturkuraca Asocio)

de tri monatoj post propono. En la kazo de malaprobo(j) la estraro decidas.

3. La taskoj de peranto: En sia lando aŭ regiono, la peranto reprezentas la asocion, varbas por ĝi kaj iniciatas kontaktojn kun landaj organizaĵoj kaj praktikantoj de la naturkuracado por diskonigi la asocion kaj oferti ĝiajn servojn. Krome li iniciatu la fondiĝon de landa sekcio de la asocio, se li konsideras la kondiĉojn favoraj kaj post akiro de konsento de la estraro.

4. Repago de kostoj: Laŭ interkonsento kun la kasisto, la peranto rajtas deklari la realajn kostojn de afranko, papero, telefono, telefakso ktp. Grandajn kostojn (vojaĝon, salajron, preslaboron ktp.) nur eblas repagi se estas antaŭa interkonsento kun la kasisto.

5. Eksiĝo: Eksiĝo eblas pro

- peto de la peranto,
- decido de prezidanto post neplenumo de la taskoj de peranto,
- decido de la estraro.

Adreso de INA:

D-ro Puramo Chong
Kwangmyong-2dong 50-5
Kwangmyong-shi
Kyonggi-do - 423-012, Koreio
puramo@korea.com

Kiel membriĝi en INA?

Simple skribu al ina-asocio@web.de kun kompleta adreso. Se vi ne havas retaliron, sendu leteron al la INA-sekretario:

Rosa Ebel, Schmiedestr. 99, 47809 Krefeld, Germanio

Indiku, ĉu vi profesie okupiĝas pri naturkuracado (kaj tiukaze vian karieron) aŭ ĉu vi simple interesiĝas pri naturkuracado.

La kotizo de INA estas 30 eŭroj jare por membroj el la A-landoj de UEA aŭ 15 eŭroj por la aliaj.

Pagu la kotizon al la konto de INA ĉe UEA: ena-oj. Vi ankaŭ povas pagi la kotizon dum UK al la ĉeestantaj estaraĵoj. Aŭ ĝiru la kotizon al la nederlanda poŝtbankkonto de UEA: 378964 aldolante 3,50 eŭrojn por la bankkosto.

Kiel membro vi ricevas kvarfoje jare la INA-revuon. Tri estas malgrandaj eldonoj kiel tiu ĉi, la kvara okaze de UK estas multe pli ampleksa.

Adreso por korespondado:

Rosa Ebel, Schmiedestr. 99,
47809 Krefeld, Germanio
ina-asocio@web.de

www.esp-ina.com